

LENIN PRI ESPERANTO

La lingvo estas fenomeno ne nur filologia, sed ankaŭ sociologia. Ĉu V. I. Lenin, unu el la transformantoj de la homa socio kaj batalanto por novaj rilatoj inter la popoloj, interesiĝis ankaŭ pri lingvo internacia?

Jen ideo, kiu al multaj venis, sed kiu longe restis sen respondo. Ku legadis atente la gazeton de EAĈSR, „Esperantista“, trovis fine la koncernan respondon en la n-ro 9-10 de j. 1948, pĝ. 92. Ĉar la temo estas ĉiam aktuala, ni ripetas tiun ĉi historion por niaj legantoj.

Lenin efektive interesiĝis pri Esperanto. Domaĝe ne estas konate, ĉu ekzistas skriba dokumento pri tio. Ni scias pri la afero laŭ sperto de persono nepre fidinda, nia s-ano prof. Miloš Lukáš, konata al niaj legantoj precipe laŭ lia aktiveco en la Esperanta literaturo. Ni citas nun el la menciita numero de de „Esperantista“:

„LENIN KAJ ESPERANTISMO. Dezirante ekscii, kiel la sovetoj traktas nian movadon, mi intervjuis en 1920 D-ron Hillerson, la tiaman estron de la Sovetia Misio en Praha. Ĉe tiu okazo mi praktike uzis Esperanton, la rolon de interpretanto prenis sur sin samideano Simon Elioviĉ, naskita en Ĥarkov. D-ro Hillerson akceptis min tre kompleze. „Mi estas feliĉa“, li diris interalie,“ povante doni al vi informojn pli favorajn, ol kiajn vi eble atendas. Mi mem fieras esti intima amiko de k-do Lenin, kun kiu mi pli ol unufoje diskutis pri la interlingvistika problemo. Vladimir Iljiĉ persone ŝatas Esperanton. Li nomas ĝin „p r o l e t a r a l a t i n o“ kaj esperas, ke ĝi helpos per sia ideala facileco efike akceli la interproksimiĝon de la tutmonda laboristaro“.

La vortojn de D-ro Hillerson mi ne kapablas – post tempo tiel longa – citi laŭlitere; tamen mi kuraĝas aserti, ke mia raporto almenaŭ laŭsence estas nepre fidela. /Miloš Lukáš/.

Laŭ nia peto, ĉu li povus diri al ni iujn detalojn pri la afero, prof. Lukáš respondis al ni antaŭ nelonge /ni tradukas/: „Mi ne povas diri pli ol tion, kion mi jam publikigis pri la afero en „Esperantista“ Mi dubas, ĉu k-do D-ro Hillerson ankoraŭ vivas /jam en 1920 li estis sufiĉe aĝa/, sed la aŭtentikecon de mia informo eble povus atesti k-do Simon Elioviĉ el Ĥarkov, kiu tiam estis mia interpretanto. Antaŭ proksimume duonjar mi skribe atentigis k-don E. Bokarev pri mia iama intervjuo al k-do D-ro Hillerson. Tiu respondis al mi provizore per poŝtkarto, sed promesis al mi detalan leteron; nur poste mi ekscios, ĉu li sukcesis elserĉi k-don Elioviĉ“.

Ni prezentas al la legantoj ĉion, kion ni scias pri la rilato de V. I. Lenin al Esperanto. Ĉar la opinio de Lenin estis jam plurfoje citata en la ĉeĥa lingvo kaj ne ĉiam adekvate al la teksto de s-ano Lukáš, ni donas ĉi tie citeblan ĉeĥan tradukon: „Esperanto je latinou proletariátu. Doufám, že svou ideální snadností pomůže účinně urychlit vzájemné sblížení dělnictva na celém světě. - V. I. Lenin“

jm

ESPERANTISTA KLUBO en Praha kunvenas ĉiumerkrede en Praha II., Ve Smečkách 26 je la 20-a horo.
Programo:

- 4.4. Miloš Lukáš /Hradec Králové/: Kiel helpis min Esperanto dum mia preskaŭ duoncentjara praktikado de ĝi.
- 11.4. ARTVESPERO DE VERDA ĈARO DE JULIO BAGHY HONORE AL LA MAJSTRO.
- 18.4. D-ro Jaromír Jermář: Hodiaŭa situacio de neesperantistaj lingvaj projektoj kaj nia rilato a lili.
- 24.4. Miloš Rudolf /Olomouc/: Ekspedicio Kon-Tiki.
- 2.5. ĜENERALA KUNVENO DE LA KLUBO /anstataŭ la 15-an de aprilo!/
9.5. Ŝtata tago ĉeĥoslovaka.
- 16.5. Theodor Kilian /Třebíč/: La okupo de la militkaptitoj en Tomsk-Siberio.
- 23.5. Ladislav Kynčl: Deveno de la vegetalaj kuriozaĵoj.
- 30.5. Jiří Pastor: Novaĵoj de elektroteknika industrio.
- 6.6. František Pytloun: Esperanto kiel nervkuracilo.

NIAJ MEMBROJ KAJ AMIKOJ.

Mi adiaŭas ĉiujn miajn amikojn en Ĉeĥoslovakio. Mi forlasas tiun ĉi landon por finvivi la reston de miaj tagoj komune kun mia filino, loĝanta en Izraelo. Plej koran dankon al ĉiuj, kiuj subtenis min en mia laboro. Mi lasas ĉi tie parton de mia koro.

Ota Ginz

OTA GINZ KUN SIA EDZINO FORLASIS ĈEĤOSLOVAKION! Ĉi tiu forveturo estis de Ginz jam longe preparata, sed ni konsolis nin, ke li ne ricevos permeson por elemigri kaj ni esperis, ke tiu simpatia esperantista paro daŭre restos kun ni. Antaŭ unu monato la permeso venis preskaŭ ne atendite. En malproksima ŝtato Izraelo vivas sola filino de gesamideanoj Ginz. Ŝi insiste vokis siajn gepatrojn sopirante dividi kun ili sian feliĉon. Tiel okazis, ke Ota Ginz kun sia edzino adiaŭis nin. Lasta ilia ĉeesto al la kunveno de EK en Praha okazis la 14-an de marto. Anstataŭ parolado de D-ro Pumpr preparita por tiu tago okazis adiaŭa vespero. Kolektiĝis multaj membroj, multaj malnovaj membroj kaj geamikoj de Ginz. S-anino Eva Suchardová enkondukis la vesperon per modela recitado de du poemoj kvazaŭ destinitaj por tiu vespero. Estis „SCII DISIRI“ de Olga Scheinpflugová en la traduko de R. Hromada, kaj poemo „ADIAŬ KAJ TUKET“ de Vítězslav Nezval, en la traduko de J. Kořínek... Kaj poste D-ro Pumpr, D-ro Kamarýt kaj la klubestro Ŝustr unu post la alia parolis al la adiaŭantoj, rememoris senlacan fruktoplenan kaj longjaran aktivecon de Ginz kaj elkore dankis por la kunlaboro. Ginz nur modeste protestis, deklarante, ke tiu laboro, kiun li faris, estis diktata de lia koro, ĉar tiu laboro al li plaĉis. – Estis mirinda vespero. Kunvenis tiom da bonaj homoj. La atmosfero estis eksterordinare sincera, bonkora kaj kortuŝa. Lastan fojon ja renkontiĝis ĉi tie la gloraj redaktintoj de Ĉeĥoslovaka Antologio, O. Ginz kaj St. Kamarýt. --- kaj dek tagojn poste, matene la 24-an de marto tridekkapa amaseto esperantista venis al la stacidomo por ankoraŭfoje premi la manojn de la du forveturantoj kaj por sincere deziri a lili ne nur bonan vojaĝon, sed ankaŭ multe da sano, feliĉo kaj kontenteco en ili nova hejmo. – Ota Ginz estas la plej malnova membro de nia Klubo. 37 jarojn daŭras seninterrompe lia membreco. En la laboro por nia afero li estis neimitebla. Kiu nun sur lian lokon?

--

NASKIĜO:

La 20-an de februaro naskiĝis dlaska esperantisto Zdeněk Jan PITRMOC, filo de nia membro Zdeněk Pitrmoc, bankoficisto, Praha-Vršovice, Novorosijská 12.

Ni sincere gratulas al la gepatroj!

EDZIĜO. S-ano František MUDRA el Hrob u Duchcova, Mlýny 26 kaj Věra ŽELISKOVÁ el Horažďovice anoncas la komencon de sia kunvivo. Ili akceptu niajn sincerajn bondezirojn!

EKP.

LA UNUA PREZENTADO DE ESPERANTIGITA „MARYŠA“ HONORE AL NIA MAJSTRO.

La dramo de fratoj Mrštík „Maryša“ estas sendube unu el niaj plej ŝatataj teatraĵoj. Kiam ni por la „Verda ĉaro de J. B.“ elektis teatraĵojn, tipajn por la ĉeĥa teatra literaturo, logis nin antaŭ ĉio „Maryša. Tamen ĝia efektivigo estis malhelpata por multaj malfacilaĵoj: „Maryša“ havas en la originalo 30 personojn, multajn statistikojn kaj grandan senparolangrolantaron, kaj krome estas verkita en dialekto. Sed la drameco de tiu ĉi ludo estis eĉ tro alloga kaj malfacilaĵoj ekzistas por esti venkitaj. Kaj post longa transskribado kaj reverkado ni do sukcesis la tutan, ne mallongigitan historion de la dramo efektivit helpe de ses geaktoroj kaj ankaŭ la malfacilaĵoj de la dialekto estis venkitaj per traduko. Kaj la 11-an de aprilo ĉeesos do –espereble- la prahaaj klubanoj la unuan prezentadon de la esperantigita ĉeĥa dramo „Maryša“. La „Verda ĉaro de Julio Baghy“ esprimas per tiu ĉi prezentado siajn estron, dankemon kaj amon el nia Majstro pruvante, ke en lia lingvo eblas prezenti ankaŭ specimenojn de tipe nacia literatura kulturo. La enkondukajn vortojn al la solen. vespero vi aŭdos de s-anino Jiřina Holá, specimenojn el la esperanta poezio prezentas s-anino Bartošíková – kaj la ĉefa programo de la vespero estos

M A R Y Š A

4 akta dramo de fratoj Mrštík.

Por la „Verda ĉaro de J. B.“ akomodis A. Seemann, esperantigis E. Suchardová.

Personoj:

Lízal, bienposedanto	A. Seemann
Lízalka, lia edzino	L. Rejthárková
Maryša, ilia filino	E. Suchardová
Vávra, muelisto	P. Sádlo
Francek, rekruto	J. Pastor, J. Ondráček
Strouhalka, onklino de Maryša	E. Řiháčková

-

La tria kaj kvara aktoj okazas 2 jarojn pli poste. Paŭzo post la dua akto.

-

GRANDA SALONO DE MALÁ SCÉNA

KOMENCO JE LA 19,30-a horo.

La „Verda ĉaro de Julio Baghy“ bonvenigas vin ĉiujn ĉefurbajn kaj eksterprahaajn gesamideanojn, deziras al vi kiel al si mem, ke vi travivu belan vesperon kaj estu kontentaj pri ĝia laboro.

VIRTUOZO JE VIOLONĈELO D-ro Pravoslav Sádlo-Páv, membro de EK en Praha kaj de ĝia „Verda ĉaro de J. B.“ koncertos en jenaj lokoj: Sokolovo 5/4, Rokycany 12/4, Chlum u Třeboně 19/4, Plzeň 2/5, Jáchymov 8/5, Cheb 10/5, Žatec 15/5, Louny 16/5, Děčín 31/5. Same bone kiel sian instrumenton li majstras nian lingvon. Pri tio ni atentigas la esperantistaron en la urboj, kie li koncertas.

Dum la kunveno de „Verda ĉaro de J.B.“ la 9-an de marto estis elektitaj jenaj funkciuloj: sekretario Ant. Slanina, reĝisoro Ant. Seemann, artgvidantino Eva Suchardová, protokolistino Jiřina Holá, mastro Ladislav Kynčl, arkivisto Dolfa Bartošík. La „Verda ĉaro“ preparas riĉan tutjaran programon kaj ricevis invitojn el eksterlando.

KION OKAZIS, KION NI AŬDIS, KION NI LEGIS, NI INFORMAS...

G R A V A I N F O R M O ! ESTAS EBLECO ALIĜI AL UEA!

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO ree komisiis prezidanton de Esperantista Klubo en Praha per la funkcio de ĉefdelegito por Ĉeĥoslovakio. Estas do eble aliĝi al UEA. Vian aliĝon skribu sur simplan poŝtkarton, sur kiun afable notu al ni jaron de via naskiĝo, jaron de via esperantiĝo kaj ĉu vi estas ano de loka esperantista klubo, grupo, rondo aŭ rondeto, aŭ kial vi ne estas ĝia membro, resp. kie vi estas organista kiel esperantisto. La kotizoj por la jaro 1956: Kategorio MA /membro sonanto/ Kĉs 50,-. MA ricevas membrokarton, kuponaron por servieto, jarlibron kaj la belan revuon ESPERANTO. – Kategorio MJ Kĉs 10 ne ricevas la revuon. Ricevas do membrokarton, kuponaron kaj la jarlibron. Aliĝojn kaj la kotizojn kolektas Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha I.

--

NI RIPETAS: kiu volas cetigi al si regulan ricevadon de nia Bulteno estiĝu membro de nia klubo.

Jarkotizoj: membro 24,-, junularo sen selajro 10,-, familia membro 8,-. Poŝtpagilo aŭ amonita al tiu ĉi numero, aŭ petu ĝin de la kasistino Anĉi Bárchochová, Praha II., Sokolská 17.

--

LA BRILAJ ĈEĤOSLOVAKAJ INSIGNOJ ESPERANTISTAJ, faritaj laŭ la desegnaĵo de nia membro Dolfa Bartošik /Ĉs. flago, super ĝi verda stelo/ ankoraŭ haveblaj po Kĉs 4,-.

--

BELA BUSTO DE NIA MAJSTRO de akademia skulptisto Josef Paša, 16 cm alta, bakita argilo, havebla po 30 Kĉs, per poŝto 36 Kĉs.

--

ĈEĤOSLOVAKA RADIO /ĉeskoslovenský rozhlas/ post la elsendo de teatraĵo „La mondo ne havas atendejon“ respondis al nia membro, kiu sendis sian kritikon: Ni dankas al vi por la atento, kiun vi dediĉis al elsendo de ludo „La mondo ne havas atendejon“ de Dekkert, pri kiu ni ricevis aron da laŭaj prijuĝoj. Ni ĝojas, ke tiu ludo venis al ni pere de esperanto samkiel en aliajn landojn.

--

ESPERANTO EN ĈIU TELEFONLIBRO: Laŭ informo de M. Adamcová el Brno aperis en nova teelefonlibro de tiu urbo ŝia nomo ankaŭ sub „Esperanto“. Krom ŝi aperis tie ankaŭ adreso de alia samideano /kiu?/. Gratulon kaj vivu sekvantoj!

--

ĈEĤA GAZETARO PRI ESPERANTO. „Nové Polsko“ n-ro 1/1956 alportas artikolon kun titolo „Tradukoj de Tuwim en Esperanton“ pri tradukoj de polaj poemoj, kiujn faris la fama poeto J. Tuwim. Oni notas, ke Tuwim sicas bone la lingvon kaj estis ĝia fervora partito. La artikolo medias vivan eldonagadon de la Asocio de Polaj Esperantistoj. – „Tatrovák“, Kopřivnice 3.2. alportas bonan propagandan artikolon por Esperanto, verkitan de Jaroslav Novosad. „Lidová demokracie“ 27.11. „Baudelaire en Esperanto“, 27.12. „Ĉeĥa literaturo en esperanta revuo“, 29.1.1956 „Dante en Esperanto“.

--

ESPERANTO EN ĈEĤA RADIO. La 26-an de februaro dum la disaŭdigo de „Pionira matenstelo“ el radiostacio Praha ni havis denove la pleuron aŭdi mension pri uzo de nia lingvo. Por la infanverko de la japana eldonejo Heibonŝa kunvenis laŭ alvoko de la radiostacio pluraj centoj da kontribuajtoj. Oni anoncis nun dek nomojn, al kiuj la radiostacio sendis po bela libro kaj oni informis denove, ke la artikoloj estos tradukitaj en Es-pon kaj senditaj al Japanio.

--

INFANEKSPOZICIO DE INFANGAZETOJ okazos en Tokio, ne de infandeseĝnaĵoj. Al ĝi ni sendis ĝiujn infangazetojn, aperantajn en nia lando. Tiel ni korektas Saigon el nia pasinta Bulteno.

--

NI HELPIS SOLVI KOMENSKÝ-PROBLEMON. Fakuloj pri nia pedagogo Komenký serĉis detalojn pri iu franca instruisto Caesar de Verdier, kiu laŭ Komenský vivis iam ankaŭ sur Kanariaj insuloj. Nia amiko

Perez konstatis fidinde, ke Verdier apenaŭ iam tie vivis. Rezulto de tiu ĉi esploro estis kun granda danko akceptita, kaj ni ĝojas, ke ni denove povis pruvi niajn eblecojn.

/daŭrigo sur la paĝo 6-a/

VERDA VOĈO DE DOKSY

Bulteno de Somera Kolegio de Esperanto en Doksy.

Aperas laŭbezone.

NI ESTU PREPARITAJ!

Ricevinte antaŭ kelkaj tagoj la revuon „Esperanto“ mi tie legis kun intereso la artikolon de I. L. „La danĝeroj de sukcesoj“, el kiu sonas la samaj zorgoj kiel en mia artikolo „Kaj kio nun?“ en la lasta V.V. La samaj zorgojn havis komitatanoj de Somera Kolegio de Esperanto en Doksy dum sia kunveno en Praha, kie ili traktis pri nunjara aranĝo de SKED. Al tiuj, kiuj ne legis supre nomitajn artikolojn, mi devas klarigi la zorgojn, kiujn havas la konsciaj kaj eĉ respondecaj esperantistoj.

En la lasta tempo dank' al UEA, Esperanto rikoltas sukcesojn. Kaj eble tio sonas pradokse, la sukceso estas danĝera, jes danĝera tiam, se ĝi trovas homon nepreparita. Pasis jam idilia tempo, kiam oni en kluboj kulturis Esperanton pro Esperanto. Venas la tempo kiam Esperanto komencas serioze ludi la rolon de „helpa lingvo internacia“ kun ĉiuj praktikaj aspektoj. Ĝi ja estis por tiu celo k r e i t a ! Mi denove ripetas: ni devas esti praktikaj. Ni devas esti preparitaj por rikolti, kion ni kun granda laboro kaj oferto semis. Venas la tempo, kiam la scipovo de Esperanto alportos ankaŭ la monan profiton al tiuj, kiuj ĝin lernis. Povas okazi, ke ĝi subite estos enkondukita en lernejojn, en grandajn entreprenojn ktp. La komitato de SKED pritraktis ĉiujn eventualaĵojn kaj decidis pri nova organizo de siaj kursoj. Estos aranĝita speciala kurso por E-instruistoj profesiaj kaj tiuj, kiuj volas fariĝi E-instruistoj. En tiu ĉi kurso estos ĉiuj preparataj por eventualaj ŝtataj ekzamenoj.

Estas necese gajni novajn adeptojn de Esperanto. Tiucele ĉiu esperantisto propagandu inter ne esperantistoj la partoprenon en kursoj por komencantoj en la Somera Kolegio de Esperanto en Doksy. Tie ili ricevos lecionojn de E. laŭ gaja Ĉe-metodo. Speciale turnu vian atenton al instruistoj – fakuloj. Tiuj estos plej bezonataj kiam venos decida tempo.

Tiuj, kiuj interesiĝas pri Ĉe-metodo havas okazon ĝin tie studi. Kompreneble estos aranĝataj ankaŭ konversacia kaj progresiga kursoj. Ankaŭ lecionoj pri oratora arto ne mankos. Tie dum diversaj diskutoj pri diversaj temoj /nur en Esperanto/ oni plej bone lernas elokventecon, rapidan pensadon rekte en la lingvo. En kursoj instruos fakuloj sub gvidado de konata pioniro kaj Akademiano D-ro Aug. Pitlík.

Aranĝu vian libertempon tiel, ke vi povu partopreni Someran Kolegion de Esperanto en Doksy de 15. VII. – 29. VII. 1956. Ne preterpasu unikan okazon! /Adreso por informoj kaj aliĝoj: Somera Kolegio de Esperanto, D o k s y u Máchova jezera./

Ant. Slanina

INFORMOJ DE LA SOMERA OLEGIO DE ESPERANTO: ankaŭ nunjare estos en Doksy aranĝataj kulturaj kaj gajigaj vesperoj. Ini planas aranĝi „Someran karnavalon“ en Staré Splavy ĉe la Mácha lago. Romantika veturo tien kaj reon per motorŝipoj. Por dimanĉo la 22-an de julio oni planas tuttagan ekskurson al Ĉeĥa paradlo per aŭtobusoj. Baldaŭ aperos prospekto de la kursaro /ankaŭ kiel aldono al nia Bulteno/. Tiu, kiu ne ricevas la Bultenon, postulu la prospekton ĉe Somera Kolegio de Esperanto, Doksy. Kiu volas jam nun ŝpari por partopreni en Doksy, skribu al Státní spořitelna en Doksy.

--

Estas MALBONA KUTIMO de esperantistoj, ke ili skribas al enlandaj oficoj en Esperanto. Tio estas malbona propagando. Memoru: Esperanto estas helpa lingvo, kiun ni uzas en traktado kun eksterlando kaj fremdlingvuloj. Kompreneble uzu ĝin en E-klubo por praktike ekzerci.

--

NIA ESPERANTISTA JUNULARO sukcesis en Britujo. Danko de ĉs. ambasadoro. La junulara Esperanto-rondeto en Žďár n. Sáz., kiun ni konas kiel tre aktivan, atingis bonegan sukceson en internacia ekspozicio de infant desegnaĵoj el 24 landoj, aranĝita en la angla lernejo en Strood. Laboraĵoj el lernejoj en Žďár n. S. inspiris specialan atenton kaj rekonon de la vizitantoj. La ekspozicion rigardis kun intereso ankaŭ membroj de la ĉs. ambasado. Du desegnaĵoj de la 14-jara lernanto Vašátko eĉ estis elsenditaj de la brita televido BBC inter aliaj plej bonaj. La Esp.rondeto en Žďár n. S. ricevis ne nur dankleteron de la aranĝantoj de la ekspozicio, sed ankaŭ leteron de la ĉs. ambasadoro en Londono, en kiu tiu ĉi dankas pro la bona propagando por la ĉs. lernejoj. /Tion ĉi ni nomas bona kontribuo al plifortigo de internaciaj kulturaj interrilatoj. Koran Gratulon! – J. Mařík, TKKE –sekciestro pro Junularo./

--

ESPERANTO-EKSPOZICIO EN PÍSEK – imitinda ekzemplo. Esp. rondeto en Písek helege aranĝis esp. ekspozicion en la urba teatro celante kaj montri la valoun de nia lingvo kaj varbi novajn adeptojn por E-kursoj. Plej grandan Laudon pro efektivigo de tiu ekspozicio meritas s-ano L. Křivánek el Písek. Dimanĉan /18.3./ inaŭguron ĉeestis multaj eksterurbaj gesamideanoj /laŭdinda ĉeesto de 11 geamikoj el Strakonice/. Ĉefa parto de la programo estis prelego de prezidanto de EK en Praha s-ano Šustr. Li entuziasme parolis pri la lastjaraj sukcesoj. S-ano Sádlo parolis pri tradukaj problemoj dum internaciaj neesperantistaj kongresoj. Pro ĉeestantaj neesperantistoj tradukis senprezare kaj senerare s-ano Křivánek. Je violonĉelo ludis s-ano D-ro Pravoslav Sádlo-Páv el Praha.

--

INICIATA GRUPO DE SOVETIAJ ESPERANTISTOJ. Laŭ rektaj informoj el UdSSR estis tie la 29-an de januaro 1956 fondita IGSE kun filioj en pluraj urboj. Ni speciale atentigas, ke ĝi ankoraŭ NE signifas oficialan organizon.

--

VOĈO EL INDONESIA, organo de Indonesia Esperanto-Asocio en sia Janusa numero medias nian Bultenon. Same faras pluraj esp. gazetoj kaj revue kaj ni denove esperimas nian ĝojon povante esti utilaj.

--

THE NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW en sia n-ro 11-12 /novembro-decembro 1955/ sur la 8-a paĝo aperigas tutpaĝan artikolon pri Somera Esperantista Tendaro Ĉeĥoslovaka laŭ la letero de Vuk Ehtner al Roan Orloff.

--

LA GRANDA MAŜININDUSTRIA EKSPOZICIO estis aranĝita aŭtune 1955 en Brno. En ĝia libro de vizitantoj ni legis jenan enskribon en Esperanto: Ni trovas vian ekspozicion vere grandstila kaj interesa por ĉiu. Alvar Perr, Buenos Aires.

--

EI TRE MULTAJ LOKOJ ni ricevis vere ĝojigajn raportojn pri nia kreskanta movado. Kun granda bedaŭro ni ne povas komuniki tiujn raportojn al nia legantaro, ĉar mankas al ni teknikaj eblecoj. Aktualajn raportojn ni publikigos en nia venonta numero.

--